# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 50, Numero 4, Aprilo 2017*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**

Karaj membroj de EFNSK,
Hodiaux ni prezentas por via atento kaj legado Strategian planon de EFNSK.
Celo de la plano estas komenci diskuton pri la estonteco de nia federacio: kie ni iras kaj kiamanere.
Kaj la estraro de EFNSK estos tre feliĉa se vi skribos al ni viajn ideojn kaj sugestojn rilate la planon.
Dankon!

## Strategia plano de EFNSK

1. Celoj
A. Konstrui membrecon
B. Plimultigi partoprenon ĉe eventoj
C. Plimultigi uzadon de la gastĉambro.

2. Paŝoj
A. Pliigi la nombron da membroj je 10% en 2017
B. Pligrandigi ĉeestadon de eventoj per 20%

3. Cel-publiko
A. Studentoj (universitatoj, lernejoj)
B. Homoj kiuj interesiĝas pri lingvoj ("plurlingvaj", poliglotoj)
C. Inteligentaj, kleraj homoj.
D. Komercistoj, kiuj ŝatus establi novajn partnerecojn kun Esperanto-parolantaj komercistoj en aliaj landoj, ekz-e, Ĉinio.
E. Homoj, kiuj ŝatas 'socian vojaĝadon'.

4. Reklamaj elementoj
A. Krei novan grafikan identecon (emblemo, elementoj de grafika komunikado: nom-kartoj, ktp)
B. Retejo: Ebleco por homoj rete membriĝi
C. Reguloj pri pres-dezajno, reklamado kaj socia amaskomunikado
D. Esperanto-Domo estu pli alloga por eksterlandaj gastoj
E. Esperanto-Domo estu pli alloga por event-ĉeestontoj.

5. Taktiko
A. Kunlaboro kun lingvaj kaj kulturaj organizoj (ekz. Korea Cultural Office, Goethe-Institut, Japan Foundation, Instituto Cervantes, ktp)
B. Partopreno je loka komunuma vivo (ekz. prezento pri Esperanto ĉe Darlington Public School, malferma tago ĉe Sydney University, lecionoj ĉe Redfern Community Centre)
C. Eventoj: Esperanto-Domo estas apud granda universitato. Ni povas varbi multajn volontulojn de Sydney University – ili simple ne ankoraŭ scias pri ni.

6. Plano

A. Doni rolojn al individuoj:
1) Publikaj rilatoj, sociaj retoj
2) Eventoj, kunvenoj
3) Volontuloj kaj staĝantoj
4) Reteja evoluigado
5) Loka komunumo
6) Artikoloj por ĵurnaloj
7) Dezajno kaj markigo
B. Instalu afiŝtabulon antaŭ Esperanto-Domo, por reklami venontajn publikajn eventojn, ekz-e kulturan tagon, filmvesperon lingvo-festivalon, ktp.
C. Planu por Zamenhof-Tago:
Kompilu liston de interesaj gastoj, prezentoj, koncert-programo
D. Esperanto-Domo estu pli alloga por eksterlandaj gastoj:
1) Renovigu banejojn
2) Renovigu gastĉambron
3) Renovigu kuirejon
4) Donu Interreton por gastoj

E. Esperanto-Domo estu pli alloga por event-ĉeestontoj:
1) Areo por rubaĵo / kompoŝto
2) Liberaj aliroj al la balkonoj; tio postulas, ke la oficejo moviĝu al alia loko
3) Anstataŭigu meblojn: seĝoj, tablo, benkoj
4) Instalu kaf-maŝinon
5) Freŝa farbo ĉie en la domon, por forigi malfreŝan malseketan odoron
6) Purigu la fenestrojn
7) Anstataŭigu aŭ lavu kurtenojn
8) Instalu eksterajn lumojn por tiri atenton al la afiŝtabulo
9) Instalu lumojn kaj seruron por la vitra ŝranko kun memoraĵoj

## Pica vespero ĉe Esperanto Domo



Sabate la 29-an de aprilo je la 5a ĉe Eperanto Domo okazos E-leciono por komencantoj. Poste je la 6a ptm komenciĝos pica vespero kaj oficiala lanĉa festo de Amikumu (nova apo por trovi kaj komuniki kun najbaroj Esperantistoj). Ĉiuj estas bonvenaj!

## Lingvaj Festivaloj




La 8-an de aprilo 2017 okazis Canada Bay lingva festivalo en Concord Library. Esperantisto el Indonezio Ario Bimo prelegis pri la java lingvo. Pri Esperanto prelegis Richard Delamore.

Sekva lingva festivalo okazos en Liverpool sabate la 6-an de majo. Pli da informoj: http://languagefestival.org/liverpool

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm;  Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320  *manly@esperanto.org.au*

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

EFNSW: Estraranoj: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922
Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde  17:00  la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic.
Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00   *(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Estraranoj: Richard Delamore, John Casey